


QUANCO

3/06

JULIO - SEPTEMBRO

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO



**Oficiala Organo de
Kuba Esperanto-Asocio**

(3/2006, jul – sep)

Aperas 4-foje jare

Eldonas:

Kuba Esperanto-Asocio

Poŝtŝafko 5120,

10500 Havano, Kubo

Telefono: ++53(7)40 4484

Fakso: 643 8729

Retadreso:

avanco@esperanto.co.cu

Ĉefredaktoro:

NORBERTO DÍAZ GUEVARA

norberto@ssp.desoft.cu

Revizias kaj kontrolas:

JULIÁN HERNÁNDEZ ÁNGULO

ALBERTO F. CALIENES

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

JUAN R. RODRÍGUEZ GÓMEZ

Enpaĝigo:

ALBERTO F. CALIENES

Reproduktado permesata

Interŝanĝo dezirata.

La kovrilo:

Kubaj esperantistoj benkedes okaze de la 75a UK okazinta en Havano, de la 14a ĝis la 21a de julio 1990. Foto: Fotoservo de la Kongresa Palaco, Havano.

estimata leganto

En tiu ĉi prikongresa numero vi povos legi la raporton de Julián Hernández Angulo, prezidanto de Kuba E-Asocio, pri lia partopreno en la Itala UK (Florenco), kies temo estis "Lingvoj, kulturoj kaj edukado al daŭrigebla evoluo".

Iom da historio pri la universalaj kongresoj estas bonvena, kaj tiel sumiĝas kelkaj tekstoj, per kiuj vi povos koni plurajn detalojn pri la ĉefa ĉiujara aranĝo de la monda Esperantistaro, inter kiuj la Havana UK en 1990.

Ne hezitu sendi al *Avanco* viajn opiniojn pri la kongresa temo, kaj pri aplikindaj strategioj en nia lando. Daŭrigebla evoluo estas ja tia: daŭrigebla, kaj viaj kontribuoj estas kiel kutime bonvenaj.

Agrablan kaj nutrivan legadon!

Kun Avancaj salutoj,



NORBERTO DÍAZ GUEVARA

enhavo

<i>Pri la UK en Florenco, Italio</i>	3
JULIÁN HERNÁNDEZ ÁNGULO	
<i>Rezolucio de la 91a UK</i>	6
<i>Cent jaroj da Universalaj Kongresoj</i>	7
ALOISIO SARTOKATO	
<i>1990: La 75a UK en Havano, Kubo</i>	13

ĈU VI SERĈAS KORESPONDAMIKON?

Se jes, sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, retadreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj dezirataj, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj

Koresponda Servo Mondskala
33 rue Louvière
FR-55190 Void-Vacon
Francio

ksmesperanto@wanadoo.fr
www.multimania.com/kosomo

Pri la UK en Florenco, Italio

Raporto de Julián Hernández Angulo, prezidanto de KEA, pri lia partopreno en la 91a Universala Kongreso okazinta en Florenco, Italio, de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 2006.



Post vojaĝo al Florenco, tra Parizo, la 29an de julio en la vespero, Maritza Gutiérrez kaj mi muntis la standon de nia lando por partopreni la Movadan Foiiron, per kiu pluraj landoj kaj multaj Esperantistoj individue povis pli aktive partopreni la kongreson. Ni dividis la standon kun Brazila E-Ligo, kiu prezentis buntajn materialojn.

En la Interkona Vespero partoprenis dancensembloj, muzikistoj kaj kantistoj el diversaj landoj, kaj mi fermis ĝin kantante "Tiel la mondo iras" kaj "Guantanamo".

30a de julio: Okazis la solena inaŭguro en granda halo malantaŭ la kongresejo, kun la partopreno de Florencaj aŭtoritatoj, diplomatoj kaj aliaj gravuloj. La vicurbestro salutis la kongresanojn kaj neesperantista lingvisto prezentis tre pensoinstigan prelegon pri la bildo kaj rolo de Esperanto ekde diversaj vidpunktoj. Estis anoncigitaj la du novaj honoraj membroj de UEA, Prof. D-ro Otto Habspra (Hungario, 1928), kiu vizitis Kubon okaze de la Unua Kongreso, en 1987, kaj Umberto Brocatelli (Italio, 1931). Mi salutis la kongresanojn nome de KEA.

En la posttagmezo mi partoprenis la kunsidon pri Afrika Agado, kie sinjorino Tereza Kapista, el Nederlando, parolis pri siaj travivaĵoj kiel kursgvidanto en Togolando, kaj du afrikanoj raportis pri la Afrika agado. Es-

tis anoncite, ke la 41a ILEI-konferenco okazos en Benino, Afriko, en 2008.

Pli ol 30 personoj partoprenis la kunsidon pri Amerika Agado, inter kiuj Renato Corsetti, prezidanto de UEA, kaj Martin Schaffer, el Germanio. Adonis Saliba prezentis la funkciadon, atingojn kaj nunan staton de grava kontribuado de nia mondoparto al Esperantujo, laŭ vidpunkto de sinjoro Joaquín Vergara: Projekto Nesto. Adonis disdonis faldfoliojn kaj aliajn materialojn pri tiu projekto, kun la informo, ke ĝis julio 2006 pli ol 70 mil homoj el pli ol 60 landoj vizitis tiun retejon, en kiu okazis pli ol 4 880 enskribiĝoj kaj agadas proksimume 200 instruistoj. Koncerne la nunan strukturon kaj konsiston de la Amerika Komisiono, Vergara, kiu gvidis la kunsidon, invitis al reviziado, ĉar ne ĉiuj povas aŭ pretas plenumi taskojn por la komisiono. Li menciis la valorajn kaj inspirajn ekzemplojn de Adonis, James Rezende Piton kaj Atilio Orellana. Laŭ Renato Corsetti, Ameriko devas esti la esperujo de la Esperanto-movado.

En la kunsido de la instruistoj, la prezidanto de ILEI prezentis novajn estraranojn, kiuj parolis pri siaj rĉspektivaj laborperspektivoj. Oni analizis ankaŭ aspektojn rilate la diversajn projektojn de ILEI kaj la Internaciajn E-ekzamenojn.

En la subkomitato Junularo oni analizis pasintajn rekomendojn, kaj ili montriĝis plenumataj: ke junularaj programoj dum la nuna UK estas bone menciitaj en la Kongresa Libro; ke estas klara priskribo pri ĉiuj ebloj, kaj antaŭe aperis informoj en Interreto. Ankaŭ la malmultekostaj loĝebloj estis bone afiŝitaj. La ĉefaj rekomendoj fare de la estraro de UEA estis: nur aliĝintoj al UK rajtu partopreni la junularan programon; oni instigu la TEJO-estraron adaptiĝi al la kalendaro por UK kaj la ILEI-Konferenco; oni subtenu plian kunlaboron inter TEJO kaj ILEI por edukaj estontajn instruistojn; TEJO varbu junajn UK-anojn informante pri la eblo ekzameniĝi dumkongrese. La subkomitato estis gvidata de Adenjo Charriere kaj Ans Bakker-Hagen.

La Nacia Vespero, kiel fermo de la kongresa tago, konsistis el svingado de flago en la Placo de la Signoria kaj el koncerto de Montara Koruso en la salono Zamenhof.

31a de julio: Kleriga Lundo. Kiel tradicie, oni organizis plej diversajn kunvenojn pri la lingvo Esperanto, pri ties historio, pri la kongresa lando, pri novaj metodoj de informado, pri la maniero organizi kongresoj, kaj pri aliaj temoj.

En la unua bloko prezentiĝis la jenaj temoj: "Tra Esperantujo" (Philippe Chavignon, Tereza Kapista kaj Daniele Binaghi); "La latina lingvo: Imperio, Eklezio, Kulturo" (Otto Prytz, Eva Barandovska kaj Gerrit Beverling); "Italaj poetoj en Esperanto" (Nicolino Rossi, Carlo Minnaja kaj Michela Lipari); "Informado: Kiel utiligi la amaskomunikilojn?" (Etsuo Miyoshi, Eva Poláková kaj Thomas Borman). En tiu lasta kunveno la gvidantoj rakontis pri siaj laboroj en Japanio, Pollando kaj Germanio. Ili insistis, ke necesas lerta, konstanta kaj profesinivela informado por prezenti tiajn mesaĝojn al la publiko.

En la dua bloko la temoj estis: "Vidi per manoj – Kiel blinduloj ĝuas arton" (Aldo

Grassini, Pierluigi Da Costa kaj Otto Prytz); "Renesanco en Italio" (Carlo Minnaja, Gerrit Beverling kaj Ranieri Clerici); "La arto paroli publike" (Wera Blanke kaj Humphrey Tonkin); "Verda Mondo" (Tatiana Anderskaya, Girindar Rao kaj Peter Kuhnel); "Scienco kaj Popolo" (Incola Minnaja, Alan Bishop kaj Ermanno Tarracchini). Mi partoprenis la kunvenon, kie Wera Blanke kaj Humphrey Tonkin brile argumentis pri la arto publike paroli.

La tria bloko konsistis el la temoj: "Veterani sed ne maljuni" (Werner Bormann kaj Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia); "La itala renesanco renkonte al la mondo" (Humphrey Tonkin, Rob Moerbeck kaj Wen Jingen); "Italioj eksterlande, eksterlandanoj en Italio" (Pasquale Zappelli, Jule Winberg kaj Anita Althear); "Orienta Mediteraneo" (Fabricio Pennacchietti kaj Maria Pontika); "Kiel organizi niajn interlingvistojn" (Detlev Blanke, Maŭro La Torre kaj Aida Cizikaite).

Antaŭ la tagmanĝo mi kantis en la ĝardeno de la kongresejo, kaj poste mi partoprenis la kunsidon de la subkomitatoj Kulturo, Informado kaj Faka Agado.

Kulturo (Gvidis Istvan Ertl kaj prezidis Claude Nourmont): La ĉefaj proponoj estis, ke UEA subtenu la organizon de ekspozicioj de pentristoj kaj aliaj artistoj en universalaj kongresoj kaj en aliaj aranĝoj; ke UEA subtenu la eldonadon de verkoj en Esperanto kaj zorgu pri pli ekvilibra dispartigo laŭ la diversaj regionoj de la mondo kaj kulturaj fonoj; ke UEA subtenu iniciatojn kiel Esperantaj retaj televido kaj radiaj elsendoj en Esperanto; ke diversaj programeroj de la Universala Kongreso aperu ĉe la reto tiel, ke neĉeestantoj povu sekvi ĝin; ke la programon oni disponigu pli frue en la reto, kaj ke ankaŭ la kleriga tago estas daŭrigebla programero.

Informado (Gvidis Jukka Pietilainen kaj prezidis Ulla Luin): Estis multaj diskutoj pri

agotago kaj la opinioj estis dividitaj. Aperis kritiko kontraŭ komuna agotago en ĉiu lando samtempe. La subkomitato proponis, ke apud la retlisto pri informado estu starigata retpaĝo pri sukcesaj informaj aranĝoj, kie eblus raporti kion la Esperantistoj faris, kaj kiel la informa agado sukcesis. Mi parolis pri la informa agado de KEA.

Faka Agado (Gvidis J. Frenquesa Sole kaj prezidis Amri Wandel): Oni pledis, ke la Faka Forumo okazu kiel eble komence de la kongreso por ebligi iniciaton de postaj dumkongresaj kunvenoj de fakaj asocioj. Oni rekomendu fakajn asociojn utiligi la Movadan Foiron por prezenti sin. Pluraj reprezentantoj de fakaj asocioj pledis por kiel eble frua reta publikigo de la kongresa plano.

En la scienca agado la ĉefaj detaloj estis kunlaboro inter UEA kaj AIS laŭ la nova kontrakto; ĝustatempa preparo de la IKU-Libro; kontaktoj kun NRO-oj kaj Unesco, kaj aparte kun Internacia Asocio de Universitatoj.

En la vespero okazis la balo, kiun mi partoprenis.

1a de aŭgusto: Matene mi partoprenis la malferman kunsidon de la Akademio. La ĉefaj ideoj pridebatitaj estis: Oni estu konservativa rilate la lingvoŝanĝigon; la Akademio estas konservativa instanco pri la unueco de la lingvo; la lingvo ne estas por ludi per ĝi; Zamenhof donacis la lingvon al la socio kaj la socio decidus amason da aferoj; oni parolas lingvon por komprenigi sin; aŭtoroj preferinde estu klaraj en la lingvo-uzo; oni instruu oficialajn vortojn.

Landa agado (Gvidis Edvige Tamtin kaj prezidis Maritza Gutiérrez): En tiu subkomitato oni rekomendis, ke UEA instigu al utiligo de aliaj kulturaj esprimoj, kiuj kontribuas pravi la pacpotencialon de Esperanto; ke UEA instigu landajn organizojn kaj lokajn grupojn laŭ konkretaj kondiĉoj, kunlaborigi katedrojn de universitatoj de tria aĝo; ke UEA daŭre instigu landajn asociojn alprok-

simiĝi al eksterasociaj instancoj, politikistoj kaj aliaj, per dialogo bone planata kaj konstanta; ke UEA daŭre instigu la landajn kaj lokajn organizojn plifortigi kunlaboron inter si rilate varbadon de gejunuloj kaj aktiviĝon de ĝemelurbaj sistemoj; ke UEA instigu landajn kaj lokajn organizojn serĉadi kaj plu ekspluati sponsoradon por partoprenigi gejunulojn en diversaj programoj edukaj kaj trejnigaj; ke UEA instigu la landajn kaj regionajn grupojn aparte esplori kaj kunlabori por kreado de regionaj komisionoj de UEA, aparte pri ekssovetaĵ landoj.

Poste mi partoprenis la kunsidon de Muzika E-Ligo kaj faris kontaktojn kun kelkaj partoprenantoj.

Posttagmeze mi ĉeestis la kunsidon pri Landa Agado gvidatan de Maritza Gutiérrez. La ĉefaj ideoj estis: ni alstrebu esti integra parto de la socio, ni ne plu estu fantaziuloj. Ni baku konstante novajn Esperantistojn. Niaj mankoj estas homfortoj, tro da eksaj membroj, manko de instruistoj, generacia retiriĝo, sento de aparteno. Ni devas tuŝi la homan senton, ni devas esti pli profesiaj, pli respondecaj; oni daŭre kontaktu amaskomunikilojn. En la vespero mi ĉeestis la urbestran akcepton kiel reprezentanto de Kubo.

2a de aŭgusto: En tiu ĉi ekskursita tago mi estis invitita de germanaj Esperantistoj vojaĝi al la urbo Pisa por vidi la turon Pisa, la basilikon kaj la baptejon.

3a de aŭgusto: En la mateno mi partoprenis la kunsidon "La estraro respondas", kaj okazis respondoj pri la nombro de aliĝintoj al UEA, pri la Centra Oficejo en Bruselo, pri UEA kaj la Civito, pri la kreado de pruntokaso, pri la situacio en Afriko, pri rilatoj inter UEA kaj Unesco.

Dum la Esperantologia Konferenco mi aŭskultis la prelegojn "Realoj kaj iluzioj de retprojekto", fare de Andreas Künzli, kaj "Uzo de nomoj en retbabilejoj", fare de Aida Cizikaite.

Rezolucio de la 91a UK

La 91a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Florenco (Italujo), kun 2209 partoprenantoj el 62 landoj, konstatinte,

— ke la Jardeko de Edukado por Daŭropova Evoluigo 2005–2014 estas grava kadro por iniciatoj cele al evoluo kiu estu socie dezirinda, ekonomie vivkapabla, kulture taŭga kaj ekologie daŭrigebla;

— ke nuntempe ekzistas gravaj minacoj kaj al biodiverseco kaj al kultura kaj lingva diversecoj, pro la reciproka dependeco inter la homo kaj la naturmedio;

— ke la nuna superrego je monda skalo de unu lingvo havas maltrankviligajn ekonomiajn, sociajn, kaj edukajn efikojn koncerne daŭropovecon, lingvan ekologion kaj la rajton je komunikado;

— ke la strebado de la Esperanto-movado al lingva demokratio kongruas kun la valoroj de transnacia edukado celanta informitajn, aktivajn civitanojn, kiuj estu kapablaj kritike kompreni sin mem kaj la ĉirkaŭan mondon por partopreni la evoluprocedon respondece kaj solidare.

Alvokas la Esperanto-komunumon aktive engaĝiĝi en la agadoj kiuj, sur diversaj niveloj, strebas antaŭenigi praktikojn koherajn kun la principoj de la bezonata ŝanĝoprocezo, kaj utiligi siajn lingvon kaj retojn serve al tiuj klopodoj.

Rekomendas al la Estraro de UEA doni al la ĉi-rilataj problemoj pli da atento en estontaj kongresoj kaj agadoj, partnere kun neesperantistaj organizaĵoj.

Konfirmas la pretecon de la Esperanto-komunumo kunlabori kun Unesko kaj aliaj organizaĵoj cele al tutviva edukado por paco, socia justeco kaj kultura diverseco, kaj atentigas ilin pri la lingva aspekto de daŭropova evoluigo.

Poste mi partoprenis la lastan sesion de la Kongresa Temo, kaj mi gvidis grupon, kiu analizis pri la farendaĵoj por garantii la daŭrigeblan evoluon.

Post partopreno en la kunveno de ISAE (sciencistoj), kie oni raportis pri la agado de la organizaĵo, pri la Universitato de AIS, en San Marino, kaj aliaj temoj, mi kantis en la ĝardeno por grupo de Esperantistoj. En la vespero okazis bonega koncerto de juna rusa esperantisto Andrej Korobejnikov, kiu mirigis ĉiujn.

4a de aŭgusto: En la kunsido de la Komitato de UEA, oni analizis la raportojn de la diversaj subkomitatoj: Financo kaj Administrado, Ekstera agado, Edukado, Informado, Kulturo, Landa kaj Regiona Agado, Faka kaj Scienca Agado kaj Junulara Agado. En la raporto pri Edukado oni informis pri la novaj membroj de la Internacia Ekzamena Komisiono, en kiu mi membras kune kun Probal Daŝgupto, Mireille Grosjean, Boris Kolker, José Antonio Leonid de León, Oliver Mazodze kaj Reza Torabi.

Oni ankaŭ parolis pri la bezono pretigi interpretistojn, kiuj bezonatas en gravaj aranĝoj. Ili ĉefe estu preparitaj de landaj asocioj. Oni aprobis la aliĝpetojn de Nepala Esperanto-Asocio kaj de Malagasa E-Asocio. Estis aprobitaj la raporto de la reĝisoro de la kongresa temo, kaj la kongresa rezolucio.

Invitite de Katalin Kovacz mi kantis en la fermo de la paroliga kurso. Posttagmeze mi partoprenis la prokludojn por la Internacia Arta Vespero, en kiu mi reprezentis Kubon.

5a de aŭgusto: Okazis la Solena Fermo, dum kiu oni faris resumon de la kongresa semajno, legis la kongresan rezolucion, anoncis gajnintojn de la Oratora Konkurso, de la Premio Deguĉi (Simo Miĵojeviĉ), de la Subvencio Signo (Projekto Nesto), kaj informis pri la disvolvo de la In-

fana Kongreseto. Oni transdonis la kongresan flagon al la LKK-prezidanto de la 92a Universala Kongreso, okazonta en Jokohamo, Japanio, kaj laŭdis kaj dankis la laboron de ĉiuj membroj de la LKK de la Florenca kongreso. Renato Corsetti adiaŭis ĉiujn nome de la estraro de UEA, kaj fine ĉiuj kantis "La Esperon".

Dum la kongreso mi renkontis kaj parolis kun pluraj E-amikoj de Kubo, kaj mi ricevis librodonacon de Ana Montesinos por la biblioteko de nia asocio.

La unuaj kvin landoj pli amase reprezentataj estis Francio (302), Italio (272), Japanio (179), Germanio (158) kaj Pollando (128).

JULIÁN HERNÁNDEZ ANGULO

Cent jaroj da Universalaj Kongresoj

Prelego de Aloisio Sartorato en Lorena, okaze de la 61a E-Renkontiĝo de Sudparaiba Valo, Brazilo, septembro 2005.

Laŭ la *Jarlibro de UEA 2005*, paĝo 29-a: "Universala Kongreso de Esperanto estas internacia manifestacio de la esperantistaro, organizata de UEA. Ĝi okazas ĉiujare en malsama lando, kun riĉa programo.

"Dum ĝi kunvenas la gvidaj organoj de UEA, fakaj kaj aliaj esperantistaj asocioj kaj organizaĵoj. Ĝi klopodas esti revuo de la plejparto de la movadaj aktivaĵoj, en ĉiuj sferoj de la vivo. Apud la laboraj partoj (ekz. ĝeneralaj kunsidoj, prelegoj pri la kongresa temo) estas ankaŭ klerigaj (Internacia Kongresa Universitato, Belartaj Konkursoj) artaj kaj distraj (teatro, balo, nacia kaj internacia vesperoj) programoj.


"La Universala Kongreso celas prezenti la movadon en ĝia tuta amplekso, kaj laŭeble diskonigi Esperanton al neesperantistoj".

Kiel ĉio komenciĝis

Pri tio rakontas al ni Edmond Privat en sia verko *Historio de la Lingvo Esperanto*, Dua Parto, paĝo 18-a:

"Ĝis 1900 kaj eĉ 1903 Esperanto estis ankoraŭ malofte parolata escepte en Ruslando. Ĝi funkciadis antaŭ ĉio skribe. Multaj el ĝiaj plej agemaj propagandistoj aŭ talentaj verkistoj en la okcidento ne kuraĝis paroli la lingvon, ĉar ili neniam havis antaŭan okazon aŭ sperton. Renkontoj inter diversnaciaj esperantistoj estis tiel maloftaj, ke oni citis ilin en la tiamaj gazetoj kiel gravajn aferojn.

"Tial la grupo en Le Havre invitis kelkajn eksterlandajn esperantistojn al publika



kunsidoj en somero 1903. Iliajn paroladojn tradukis lernantoj de la kurso. La eksperimento bonege sukcesis kaj la facila parolobleco de la lingvo entuziasmigis la aŭskultintojn.

El tiu ĉi provo devenis la Universalaj Kongresoj de Esperanto. Efektive la grupo en Le Havre rekomencis tom pli grande la saman en 1904 kaj ĝi donis ideon al la aliaj marbordaj grupoj francaj kaj anglaj organizi vere internacian feston en Esperanto. Ĝi okazis la 7-an kaj 8-an de Aŭgusto 1904 en Calais kaj Dover kun oficialaj akceptoj de urbestroj, bankedoj, festparoloj, kantoj ktp.

La unuan fojon ducent homoj diversnaciaj – ĉefe anglaj kaj francaj – kunvenis kaj interparolis en Esperanto. La sukceso estis tiom granda kaj la entuziasmo tiel varme vekita, ke la ĉeestintoj proponis organizi veran kongreson en Aŭgusto 1905. Advokato Michau el Boulogne sur Mer promesis aranĝi tion en sia urbo”.

La antaŭmilitaj kongresoj

Do la Unua Universala Kongreso de Esperanto okazis en la franca urbo Boulogne-sur-mer, en Aŭgusto 1905. Pri ĉi tiu historia momento de la E-movado, rakontas Edmond Privat, kiu estante nur 16-jara mem ĉeestis tiun kongreson, en sia verko *Vivo de Zamenhof*, paĝo 63-a:

“Trans ĉiuj stratoj de l’ urbeto marborda balanciĝis verdaj flagoj kun la stelo de l’ espero. Ĉirkaŭ la teatro kunveneja jam aŭdiĝis nur la lingvo internacia. Angloj kun flanela ĉapo, Francoj en solena frako, Poloj, Rusoj, Holandanoj en vojaĝa vesto, ĉarmaj Hispaninoj kun koloraj ŝaloj renkontiĝis sur la placo kaj babilis kune. Ili sin komprenis. Flue kaj facile flugis la paroloj. De lipoj al oreloj. De Svedoj al Italoj. Falis, falis muroj inter la popoloj.

”Benite jam venis vespero. Sur la stratoj ekmallumis. En kongresejon ĉiu nun eniris por la malferma kunsido. Rapidis alkurantoj. El hoteloj. El haveno. El stacidomo rekte kun valizoj en la mano. La teatro de l’ urbeto jam pleniĝis tro malgranda la ĉambrego. Miloj da samideanoj premiĝis tie. De partero al balkono zumadis Esperanto. Preskaŭ neniu vidis jam Zamenhof. La plej multaj konis lin nur per la genia verko, per mallonga letereto, ame konservata en arĥivoj de la grupo, aŭ per portreto pendigita ĉe muro de l’ sidejo.

Subite eksonis la muziko de l’ himno “La Espero”. Samtempe ĉiuj stariĝis... Jen sur scenejo, kun estraro de l’ kongreso, eniris la amata Majstro. Malalta, timema, kortuŝita, kun frunto tre granda, rondaj okulvitroj, barbeto jam griza. Ĉio jam flugis aŭ svingiĝis en aero, manoj, ĉapoj, tukoj en duonhora aklamado. Kiam leviĝis post salutoj de l’ urbestro, la fervoro retondregis. Sed jam li ekparolis. Ĉesis la bruo. Ĉiuj residiĝis. Tra silento sonis liaj vortoj:

”Mi salutas vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj el la granda tutmonda homa familio, kiuj kunvenis el landoj proksimaj kaj malproksimaj, el la plej diversaj regnoj de la mondo, por frate premi al si reciproke la manojn pro la nomo de granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas...”.

Tiel sonis, plenaj de emocioj, la vortoj de Edmond Privat pri la unuaj momentoj de la Bulonja Kongreso.

La antaŭmilitaj kongresoj karakteriziĝas precipe pro tio, ke la iniciatinto de la lingvo ĉeestis ilin.

Per siaj paroladoj oficialaj, li prilumis la vojon sekvotan de la movado. Al la lingvo li algluis sendube la tiel nomatan “internan ideon de Esperanto”, donante al Esperanto ĝian ideologian fonon: “justeco kaj frateco inter ĉiuj popoloj”. Escepte de tiuj de Washington (1910) kaj San Francisco (1915),

ĉiuj aliaj kongresoj okazis en la eŭropa kontinento.

Ankaŭ en tiu periodo oni vidas la estiĝon de gravaj movadaj institucioj: Lingva Komitato, en 1906 (poste Akademio de Esperanto), la Konstanta Komitato de la Kongresoj (1906) kaj Universala Esperanto-Asocio, en 1908. Ankaŭ gravis kaj havis siajn efikojn sur la Movadon la Ido-skismo, en 1906/1907. Kaj evidente la UK havis specialan rolon en tiuj eventoj.

Unu post la alia sekvas la antaŭmilitaj UKoj: Boulogne-sur-mer, Francio (1905, 688 aliĝintoj), Genève, Svislando (1906, 1 200), Cambridge, Britio (1907, 1 317), Dresden, Germanio (1908, 1 500), Barcelona, Hispanio (1909, 1 500), Washington, Usono (1910, 357), Antwerpen, Belgio (1911, 1 800), Kraków, Pollando (1912, 1 000), Bern, Svislando (1913, 1 203) kaj Paris, Francio (1914, 3 739), kiu ne okazis pro la eksplodo de la milito. Dum la milito, en 1915, okazas en San Francisco, Usono, la 11-a UK, al kiu aliĝis nur 163 homoj.

La intermilitaj kongresoj

Zamenhof mortas en 1917. La milito malorganizas la movadon. Estas necese rekonstrui ĉion. Do nova defio por la tiama movado: postvivi al la iniciatinto de la internacia lingvo. La unua postmilita kongreso estas kunvokita al Den Haag, Nederlando, en 1920, sed allogas nur 408 partoprenantojn. Sed al la sekvanta, en Praha, Ĉeĥoslovakio, jam aliĝas 2 561 personoj. Tamen estis epoko de politika radikalismo kaj en tiu Praha kongreso fondiĝas Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), per kio la rompo inter la laborista kaj neŭtrala E-Movado estis plenumita fakto. De tiam la SAT-Kongresoj fariĝas fortaj konkurantoj al la UEA-Kongresoj de la neŭtrala E-movado. En 1933, laŭ la interkonsento de Kolonjo, UEA pre-

nas sur sin la taskon organizi la universalaĵajn kongresojn kaj tiun taskon ĝi plenumas ĝis hodiaŭ.

Ĉiuj sekvantaj kongresoj ĝis la eksplodo de la Dua Mondmilito okazis senescepte en la eŭropa kontinento: Helsinko, Finnlando (en 1922, kun 850 aliĝintoj), Nürnberg, Germanio (en 1923, kun 4 963 – la plej multnombra intermilita kongreso!), Wien, Austrio (en 1924, kun 3 054), denove Genève, Svislando (en 1925, kun 953), Edinburgo, Britio (en 1926, kun 960), Danzig (en 1927, kun 905), Antwerpen, Belgio (en 1928, kun 1 494), Budapeŝto, Hungario (en 1929, kun 1 200), Oxford, Britio (en 1930, kun 1 211), Kraków, Pollando (en 1931, kun 900), Paris, Francio (en 1932, kun 1 650). En 1933, en plena komenco de la nazia reĝimo, okazas en Köln, Germanio, la 25-a UK, kun 950 aliĝintoj. Sekvas Stockholm, Svedio (en 1934, kun 2042), Roma, Italio (en 1935, kun 1 442), denove Wien, Austrio (en 1936, kun 854). La 50-jariĝo de Esperanto, en 1937, estas festata en Warszawa (Varsovio), Pollando, per la okazigo de la 29-a UK, kun 1 120 aliĝintoj. Sekvas London, Britio (en 1938, kun 1 602) kaj denove Bern, Svislando (en 1939, kun 765 aliĝintoj), la lasta UK de la intermilita periodo.

Postmilitaj kongresoj

Evidente ke, pro la Dua Mondmilito, ne okazis UK inter 1940 kaj 1946. La postmilitajn kongresojn oni povas dividi en du periodojn. La unua iras de 1947 ĝis 1990, okaze de la falo de la Berlina Muro kaj la dua post tiu dato ĝis la hodiaŭaj tagoj. Tamen ni povas subdividi la unuan periodon en du fazojn. Dum la tuta unua fazo, kiu iras de 1947 ĝis 1974, estas la tempo de la regado de Ivo Lapenna, la moderniganto de la E-movado. La fazo inter 1974 kaj 1990 estas la post-Lapenna fazo.

La postmilita UEA ĝis 1974 estas sub la influo de Ivo Lapenna, unue kiel ĝenerala sekretario kaj poste kiel prezidanto. Kiel moderniganto de la E-movado, Lapenna forte influis la tutan movadon kaj kompreneble ankaŭ la UK. Por doni pli profesiecan aspekton al la kongresoj estis kreita en 1947 la posteno de Konstanta Kongresa Sekretario. Grava ero estis la enkonduko en 1948 de la Internacia Somera Universitato (poste Internacia Kongresa Universitato), kun aro da prelegoj de gravaj profesoroj dum la UK. En 1950, laŭ propono de Reto Rosseti, estis enkondukitaj la Belartaj Konkursoj de UEA, kun pluraj branĉoj kaj kies rezultoj estis de tiam anoncitaj dum la UK. Ankaŭ en tiu sama jaro estis proponita la Oratora Konkurso, okazinta ĉiam dum la UK.

En 1954, akceptiĝis nova Kongresa Regularo multe pli detala precipe rilate al organizaj demandoj, la prezidantaro de la kongreso, la oficialaj aranĝoj, la roloj de la Estraro, Loka Kongresa Komitato kaj Konstanta Kongresa Sekretario. Antaŭ ĉio Lapenna per sia celtrafa laboro levis la eksteran prestiĝon de la UK. Jaron post jaro la UKoj fariĝis ĉiam pli atentata de la vasta publiko, de la aŭtoritatoj kaj kulturaj instan-

coj kiel rimarkinde gravaj eventoj. Menciindas ankaŭ la okazigo ekde 1961, kadre de la UK, de Internaciaj Artaj Festivaloj, impona kultura evento kaj samtempe manifestacio pri la atingoj de la Internacia Lingvo sur la arta kampo.

La programoj ĝenerale konsistis el teatraj prezentadoj, kantoj, dancoj, poezideklamado, ekspozicioj, filmoj kaj prelegoj pri artaj temoj.

Laŭvice sekvis la jenaj kongresoj: Bern, Svisio (en 1947, kun 1 370 aliĝintoj), kie okazas la kunfandiĝo de IEL kaj UEA, sub la nomo UEA; Malmö, Svedio (1948, 1 761 aliĝintoj); Bournemouth, Britio (1950, 1 534); Paris, Francio (1950, 2 325); München, Germanio (1951, 2 040); Oslo, Norvegio (1952, 1 614); Zagreb, Jugoslavio (1953, 1 760), la unua UK en unu el la socialismaj landoj; Haarlem, Nederlando (1954, 2 353 aliĝintoj); Bologna, Italio (1955, 1 687); København, Danio (1956, 2 200); Marseille, Francio (1957, 1 468); Mainz, Germanio (1958, 2 021); Warszawa, Pollando (1959, 3 256), la dua en socialisma lando, feste al la naskiĝa centjariĝo de Zamenhof; Bruxelles / Brussel, Belgio (1960, 1 930 aliĝintoj); Harrogate, Britio (1961, 1 646); København, Danio (1962, 1 550); Sofia, Bulgario (1963, 3 472); Den Haag, Nederlando (1964, 2 512); Tōkyō, Japanio (1965, 1 710), la unua en la azia kontinento; Budapest, Hungario (1966, 3 975); Tel Aviv / Rotterdam, Nederlando (1967, 1 265), unue invitita al Israelo, sed pro la eksplodo de la milito inter tiu lando kaj la arabaj landoj, lastmomente translokita al Rotterdam; Madrid, Hispanio (1968, 1 769 aliĝintoj); Helsinki, Finnlando (1969, 1 857); Wien, Aŭstrio



(1970, 1 987), kun la ĉeesto de la Prezidanto de la Respubliko, Franz Jonas, mem esperantisto; London, Britio (1971, 2 071 aliĝintoj); Portland, Usono (1972, 923), la tria en Usono; Beograd, Jugoslavio (1973, 1 638) kaj Hamburg, Germanio (1974, kun 1651). Tie okazas grava movada krizo, kiam Lapena retiriĝas el UEA [...].

La dua fazo de tiu unua periodo postmilita iras de 1975 ĝis 1990. Malgraŭ la denuncoj de Lapenna, UEA konserviĝas neŭtrala laŭ politika vidpunkto kaj la ceteraj estraroj de la organizado tenas la UK en alta nivelo. La kongresoj okazas kaj en kapitalismaj kaj en komunismaj landoj. Unuafoje okazas UK en la suda hemisfero (Brasilia, Brazilo) kaj en Beijing, Ĉinio. La UK survojas al malpli eŭrocentrismo tendenco.

En tiu dua fazo de la postmilita periodo, laŭvice okazas la jenaj kongresoj: København, Danio (en 1975, kun 1 227 aliĝintoj); Athina, Greklando (1976, 1 266); Reykjavik, Islando (1977, 1 199); Varna, Bulgario (1978, 4 414); Luzern, Svislando (1979, 1 630); Stockholm, Svedio (1980, 1 807); Brasilia, Brazilo (1981, 1 749), unua en Brazilo, Sudameriko kaj Suda Hemisfero; Antwerpen, Belgio (1982, 1 899 aliĝintoj); Budapest, Hungario (1983, 4 834); Vancouver, Kanado (1984, 802); Augsburg, Germanio (1985, 2 311); Beijing, Ĉinio (1986, 2 482), la unua en tiu giganta azia lando; Warszawa, Pollando (1987, 5 946 aliĝintoj), feste al la centjariĝo de Esperanto (la plej frekventita ĝis nun!); Rotterdam, Nederlando (1988, 2 321 aliĝintoj); Brighton, Britio (1989, 2 280) kaj La Habana, Kubo (1990, 1 617 aliĝintoj), kie la ŝtatestro Fidel Castro sin deklaras "soldato de Esperanto".

La UK post la falo de la Berlina Muro

La okazintaĵoj de la naŭdekaj jaroj ankaŭ influas la E-movadon. La falo de la Berlina

Muro, kiu simbolas la pereon de la komunistaj reĝimoj en Eŭropo, la teknologia progreso, la ekesto de Interreto kaj la kreskanta tutmondiĝo ŝanĝas la vojon de la UK. UEA ne plu kongresas ekskluzive en Eŭropo, sed ankaŭ en Azio, Mez-Oriento, Oceanio kaj Ameriko. Mankas nur Afriko por kompletigi la tutmondiĝon de la UK.

Laŭvice okazas ekde 1991 la jenaj UK: Bergen, Norvegio (en 1991, kun 2 400 aliĝintoj); Wien, Aŭstrio (1992, 3 033); Valencia, Hispanio (1993, 1 863); Seoul, Koreio (1994, 1 776); Tampere, Finnlando (1995, 2 443); Praha, Ĉeĥio (1996, 2 972); Adelaide, Aŭstralio (1996, 1 224), la unua en la oceania kontinento; Montpellier, Francio (1998, 3 133); Berlin, Germanio (1999, 2 712); Tel Aviv, Israelo (2000, 1 212), la unua en Mezoriento; Zagreb, Kroatio (2001, 1 691); Fortaleza, Brazilo (2002, 1 484), la dua en Brazilo; Göteborg, Svedio (2003, 1 792); Beijing, Ĉinio (2004, 2 031), la dua en tiu azia urbo kaj lando; Vilnius, Litovio (2005, kun 2 344 aliĝintoj).

Sekvos Firenze, Italio (2006), Jokohama, Japanio (2007) kaj probable Rotterdam, Nederlando (2008, feste al la naskiĝa centjariĝo de UEA!).

Konkludo

Ekde la historia kongreso de Boulogne-sur-Mer, en 1905, modesta sed eikvanta, ĝis la nuntempaj UK-oj kun plurmiloj da partoprenantoj, la UK plenumas sian taskon, t.e., fariĝi renkontiĝejo kaj samtempe forumo pri movadaj temoj. Sed ŝvebas super ĉiuj ili la spirito kaj la etoso de la Bulonja kongreso trafe esprimitaj de Zamenhof dum la 2-a Universala Kongreso de Esperanto, en Ĝenevo, tiel:

"Vi memoras kiel forte ni ĉiuj estis entuziasmigitaj en Bulonjo sur Maro. Ĉiuj personoj, kiuj partoprenis en la tiea kongreso,

konservis pri ĝi la plej agrablan kaj la plej entuziasman memoron por la tuta vivo, ĉiuj ĝin nomas 'la neforgesebla kongreso'. Kio do tiel entuziasmigis la membrojn de la kongreso? Ĉu la amuzoj per si mem? Ne, ĉiu ja povas havi sur ĉiu paso multe pli grandajn amuzojn, aŭskulti teatraĵojn kaj kantojn multe pli bonajn kaj plenumatajn ne de nesupertaj diletantoj, sed de plej perfektaj specialistoj! Ĉu nin entuziasmigis la granda talento de la parolantoj? Ne; ni tiajn ne havis en Bulonjo. Ĉu la fakto, ke ni komprenis nin reciproke? Sed en ĉiu kongreso de samnaciaoj ni ja komprenas nin ne malpli bone, kaj tamen neniu nin entuziasmigas. Ne, vi ĉiuj sentis tre bone, ke nin entuziasmigis, ne la amuzoj per si mem, ne la reciproka sinkomprenado per si mem, ne la praktika utileco, kiun Esperanto montris, sed la interna ideo de la esperantismo, kiun ni ĉiuj sentas en la koro. Ni sentis, ke komenciĝas la falado de la muroj inter la popoloj, ni sentis la spiriton de la ĉiuhoma frateco. Ni konsciis tre bone, ke ĝis la fina malapero de la muroj, estas ankoraŭ tre kaj tre malproksime, sed ni sentis, ke ni estis atestantoj de la unua forta ekbato kontraŭ tiuj muroj; ni sentis, ke antaŭ niaj okuloj flugas ia fantomo de pli bona estonteco, fantomo ankoraŭ tre nebula, kiu tamen de nun ĉiam pli kaj pli korpigados kaj potenciĝados.

Jes, miaj karaj kunlaborantoj! Por la indiferenta mondo Esperanto povas esti nur afero de praktika utileco. Ĉiu, kiu uzas Esperanton aŭ laboras por ĝi, estas esperantisto, kaj ĉiu esperantisto havas plenan rajton, vidi en Esperanto nur lingvon, simplan, malvar-

man internacian komprenigilon, similan al la mara signaro, kvankam pli perfektan. Tiaj esperantistoj kredeble ne venos al niaj kongresoj aŭ venos al ili nur por celoj esploraj aŭ praktikaj aŭ por malvarma diskutado pri demandoj pure lingvaj, pure akademias, kaj ili ne partoprenos en nia ĝojo kaj entuziasmo, kiu eble ŝajnos al ili naiva kaj infana. Sed tiuj esperantistoj, kiuj apartenas al nia afero ne per sia kapo, sed per sia koro, tiuj ĉiam sentos kaj ŝatos en Esperanto antaŭ ĉio ĝian internan ideon; ili ne timos, ke la mondo moke nomos ilin utopiistoj kaj la naciaj ŝovinistoj eĉ atakos ilian idealon kvaŭzaŭ krimon; ili estos fieraj pri tiu nomo de utopiistoj. Ĉiu nova kongreso fortikiĝos en ili la amon al la interna ideo de la esperantismo, kaj iom post iom niaj ĉiujaraj kongresoj fariĝos konstanta festo de la homaro kaj de homa frateco".

Bibliografio

- LAPENNA, IVO / LINS, U. / CARLEVARO, T.: *Esperanto en Perspektivo. Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo*, UEA, London-Rotterdam, 1974.
- ZAMENHOF, L. L.: *Esperanto Modelo*, FEB, 1987.
- PRIVAT, EDMOND: *Historio de la Lingvo Esperanto*, Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig, 1927.
- *Vivo de Zamenhof*, The Esperanto Publishing Co., 1957.
- UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO: *Jarlibro de UEA 2005*, UEA, Rotterdam, 2005.
- Fonto: <http://www.kke.org.br/esperanto/prelegoj/>

De la 15a ĝis la 17a de decembro...

Zamenhofs Metiejo

en la orienta Kuba urbo Guantánamo

1990: La 75a UK en Havano, Kubo

De la 14a ĝis la 21a de julio 1990, la tutmonda esperantistaro renkontiĝis en Havano okaze de la Universala Kongreso, kies temo estis "Esperanto, evoluo, kultura diverseco". Kun 1 617 aliĝintoj, la kongreso okazis en la Kongresa Palaco, kaj la Artaj Vesperoj en la Teatro Karl Marx. Avanco prezentas al vi kelkajn tekstojn aperintajn en la Kongresa Libro.

**Saluto de la urbestro de Havano,
Pedro Chávez González**

Estimataj gekongresanoj!

Estas plezuro por nia urbo gastigi la tutmonde konatan Universalan Kongreson de Esperanto.

Malgraŭ tio, ke la Esperanto-movado en Havano relative junas, ni sufiĉe profunde konatiĝis kun la atingoj kaj streboj de la tutmonda E-komunumo kaj sincere konsideras, ke principe niaj celoj koincidas.

Pro tio, ĉiuj urbaj institucioj kunlaboris por la sukcesigo de la kongreso, por ke vi fartu hejmece en nia 471-jara Havano, kies centra urboparto estis deklarita heredaĵo de la homaro.

Nia ĉefurbo alfrontas nun grandan konstruprogramon, kiu altiĝos la vivnivelon de ĝiaj loĝantoj, kies sindediĉo, laboremo kaj inteligenteco kunlabore kun amikaj eksterlandaj institucioj, estas ĉefelemento por la transformiĝo en pli belan, homan kaj funkciivan urbon.

Grandan sukceson kaj bonfarton ni deziras al ĉiuj gekongresanoj. Mi certas, ke vi ricevos la fratecan senton de ĉiuj havananoj, por ke revene al viaj landoj vi fariĝu eternaj amikoj de Havano.

**Saluto de la Alta Protektanto
de la 75a Universala Kongreso
de Esperanto,
d-ro Carlos Rafael Rodríguez,
vicprezidanto de la Ŝtata kaj Ministra
Konsilioj de Respubliko Kubo**

Lingva komunikado estas privilegio de la homo. La serĉo de komuna lingvo, venkanta diferencojn, foriganta distancojn kaj kuniganta la homojn sendistinge pri rasoj kaj pri propra historio, estas nobla tasko. Inter ĉiuj penoj kunigi la homojn, Esperanto montris ekzemplan persiston, donintan al ĝi plej grandan rekompencon.

Kiam militoj ŝajnis detruji ĝin, Esperanto elmergiĝis kun neatendita forto. Pere de Esperanto kuniĝas nuntempe viroj kaj virinoj, kiuj montras persiston en la idealo de unuiĝo. Pli ol cent jaroj da penado signifas la konfirmon de la espero.

La esperantistoj sciis teni ĝin. Nin honoras, ke ili elektis kiel sidejon de la nuna Universala Kongreso Kubon, landon malgrandan sed malferman al solidaro inter la homoj, landon pruvintan, ke la Esperanta devizo pri unuiĝo ne nur ne estas fremda al ĝi, sed forte ligita al ĝiaj aspiroj.

"Palpi elefanton"

Stefan MacGill

Vi certe konas la rakonton pri la hinda reĝo, kiu petis kvinon da nevidantoj priskribi elefanton: ĉiu ekzamenis malsaman parton kaj malsame konkludis. Laŭ sia amplekso kaj diverso la Universala Kongreso iagrade similas elefanton, kaj la unuafojaj kongresanoj estas tiuj plej malkapablaj difini kaj sekve ĝui ĝin. Niaj kongresoj provas esti iom de ĉio: kultura festivalo, socia evento, movada laborejo, scienca konferenco, varba platformo, partopreniga forumo, distrejo, kaj unika mikrokosma lingvo-komunumo. Tiu celosvarmo igas la Kongreson samtempe bunta, frustra kaj nepriskribebla. Ĉijare ĝi ne estos tiom granda, sed pro la aparta bunto ĝi certe ne similos elefanton el kolora vidpunkto. [...]

Kongresa temo:

"Esperanto, evoluo, kultura diverseco"

D-ino Jane Edwards,

(Universitato de Hartford, Usono,
reĝisoro de la Kongresa Temo).

Ĉijare ni reiros al la modelo de la stokholma kongreso en 1980: ni klopodos utiligi la Universalan Kongreson ne nur por aŭskulti la saĝajn vortojn de niaj eminentaj kolegoj pri nia kongrestemo, sed ankaŭ invitas la aktivan partoprenon de ĉiuj kongresanoj. Mi petas vin porti al niaj kunsidoj ne nur vian paciencon atenton, sed ankaŭ viajn ideojn kaj viajn vivspertojn – senkonsidere ĉu vi estas universitatano kaj ekonomisto, aŭ unuafoja kongresano, al kiu mankas akuzativoj kaj kiu neniam eniris universitatan konstruaĵon.

Ni traktos la temon en kvar kunsidoj, tiel aranĝitaj, ke oni povu partopreni ĉiujn. Tamen, ne necesas ĉeesti ĉiujn por kompreni

la enhavon, ĉar ĉiu kunsido havos sian propran subtemon. Cetere, la celo estas iom eduki ĉiujn partoprenantojn, eĉ niajn eminentulojn. Ĉiam eblas pli bone kompreni la diversan de nia hodiaŭa mondo. Kiel mond-civitanoj ni devas ankaŭ pli atente studi la proceson de ekonomia evoluo kaj ties rezultojn. Mi petas do, ke vi ne hezitu kunporti viajn ideojn kaj spertojn por diskuti kaj debati, kaj ankaŭ viajn demandojn kaj dilemojn pri la estonteco de nia malgranda planedo. [...]

"Kultura diverseco kaj ekonomia disvolviĝo"

D. K. Jordan

Por etnologo, la "kulturo" de iu aŭ alia homa grupo konsistas en ĉiom de la pli malpli komunaj komprenoj de membroj de tiu grupo transdonitaj de unu membro al alia. Kompreneble ekzistas tiom da kulturoj, kiom da socioj, kaj la kulturo de individua socio evoluas konstante, influante aliajn kaj de ili influate.

Kulturoj en konstanta kontakto dum la historio montras pli multajn komunajn trajtojn ol tiuj historie tre disaj, almenaŭ se la rilataj socioj estas pli malpli de la sama "nivelo" de organiza ordo.

En nia nuna epoko de monda komunumo kaj de ĉiam pli konstanta kontakto inter socioj, des pli inter socioj t.n. "disvolvitaj", la interŝanĝo de kutimoj kaj komprenoj fariĝas ĉiutage pli intensa. Kaj, kompreneble, la interligitaj socioj emas evolui en direkto de ĉiam pli granda sameco.

Ĉu ni perdadas ion? Jes, kompreneble. Ni perdas nian izolon. Ni perdas nian individuecon. Se mi adoptas vian pli bonan solvon al komuna problemo kaj forlasas mian malpli efikan, mi perdas parton de mia unikeco.

Ĉu do ekonomia disvolviĝo minacas kulturen diversecon? Jes, certe. Kiam en ĉiu urbo de la planedo oni povos aĉeti la saman markon de skribilo, havi same demokratan registaran sintenon, aŭ same efikajn medicinojn, ni havos malpli da vario inter ni.

Plej ofte (certe ne ĉiam) la diversecon, kiun ni perdas, ni taksas plene perdinda. Ekzemple oni nur vane serĉos registaron, kiu religie manĝigas la civitanojn unu al alia, sistemo trovebla antaŭ kvincent jaroj. Sklaveco nun ĉie estas malleĝa kaj ĉie malofita, kvankam ĝi ofitis antaŭ nur ducent jaroj. De la mondo tute malaperis variolo. Do, ni perdis kulturen diversecon.

Diverseco en si mem, do, ne nepre estas granda avantaĝo al la homoj, kiuj ĝin partoprenas. Kiam oni protestas, ke oni deziras ŝirmi kaj gardi sian diversecon, sian unikecon, siajn kulturojn individuajn kaj siajn tradiciojn, oni efektive pensas pri nur parto de sia tuta "kulturo": kelkaj manĝaĵoj, literatura heredaĵo, muzikaj instrumentoj, festoj, proverboj, artaĵoj, familiaj moroj k.s.

Laŭ mia sperto, kiam multaj personoj en socio memkonscie deziras subteni tiajn kulturajn, kiam ili ne deziras ilin perdi, tiam la trajtoj restas: koreaj dancoj daŭras en industriiginta Koreio, ĉar koreoj daŭre dancas. Kio malaperas estas tio, kion oni ne aparte deziras subteni: tajvanaj pupteatroj malaperadas en industriiginta Tajvano, ĉar tajvananoj plejparte preferas ilin ne rigardi. Se do oni havas intereson pri konservo de kultura tradicio, la vojo ŝajnas klara: oni ĝin uzu!

Tamen la afero ne estas tiel simpla. Eble tajvanaj pupteatroj malaperas, ekzemple, ĉar altiĝis la prezo de laboro ĝis tiu punkto, ke oni ne povas provizi ilin per necesaj prezentiloj. Tiukaze, la perdo de la tajvana pupteatra tradicio fondiĝas ne sur manko de intereso, sed sur ekonomiaj ŝanĝoj aliloke dezirataj. La falo de la pupteatroj estas do analizabla en la kadro de kultura perdo pro


ekonomia disvolviĝo. Sed efektive en Tajvano (por daŭrigi la ekzemplon) ne tute malaperis pupteatroj. Mi eĉ kuraĝas aserti, ke la arto atingis novan pinton pro la televido! Dum malaperadas la tre simplaj vojaĝantaj pupaj trupoj, kiuj antaŭ nur kelkaj jaroj vizitis la vilaĝojn por prezenti spektaklojn kaj vendi medicinojn, venas nove alta nivelo de pupteatra arto videbla ĉiutage en la televido. Ion perdinte, la tajvananoj ankaŭ ion gajnis. Ĉu ili pli perdis ol gajnis? Eble. Eble ne.

Ne dubblas, ke disvolviĝante ekonomie ni homoj perdas kulturen diversecon. Pli dubblas, ke tio estas nepre malbona afero (krom por etnografoj kaj turistoj). Ĉu tia evoluo signifas, ke post kelkaj jaroj mankos al ia planedo ĉia kultura vario? Tute ne. Mankos al ni (espereble) tia vario, kia fondiĝas sur diverseco de ekonomia disvolviĝo. Restos la kulturaj tradicioj, kiuj fondiĝas sur niaj diverslokaj historiaj, artaj kaj lingvaj tradicioj, kelkfoje en iom novaj formoj (kiel la tajvanaj televidaj pupoj), kaj pro la financa subteno, kiun ebligas ekonomia disvolviĝo, eĉ ofte en pli eleganta formo (kiel nunaj koreaj dancoj). Kompreneble lingvaj tradicioj, eble la malplej facile transpunteblaj kaj malplej intime ligitaj al ekonomio, havos privilegian lokon inter la indikiloj de homa diverseco.

Ni kompreneble devas zorge gardi amajn kutimojn kaj tradiciojn. Sed senpensa kontraŭstraro al ekonomia disvolviĝo, samkiel aliaj senpensajoj, malmulte kontribuas al la feliĉo de la homaro.

Kiel nomiĝis la salonoj de la kongresejo?

Paul Ariste, Andreo Cseh, Antoni Grabowski, Hector Hodler, Kálmán Kalocsay, Ivo Lapenna, Masao Miyamoto, Fernando Ortiz, Edmond Privat, Neil Salvesen, Lazaro Ludoviko Zamenhof.



**Esperanto:
Linukso de la lingvoj**

**Linukso:
Esperanto de la komputiloj**

AVANCO

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO

Kuba Esperanto-Asocio

Poŝtflako 5120, CU-10500 Havano, Kubo

Telefono: +53(7)40 4484; Fakso: 649 8729

avanco@esperanto.co.cu



Ciferecigis: Javier Ramos
@Radioamatoro